


Bulgara **ESPERANTISTO**



1966

4

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. Glora bulgara epopeo (Nikola Uzunov) . . .	1
H. L. Branzburg. Elkora danko el Sovet-Unio . . .	2
N. Aleksiev. 100-jara datreveno de la naskiĝo de Penĉo Slavejkov . . .	3
Penĉo Slavejkov. Cent dudek herooj . . .	4
Toma Ajolov. La fumanto . . .	4

JUNA ESPERANTISTO

Ulrich Lins. Seminario diskutis pri „Li kaj ŝi“ . . .	5
---	---

ORGANIZA VIVO

N. Bojaĝiev, D. Petkova, P. Kamburov, Jdr., Iv. Zahariev, Ŝ. Kukuŝev, Й. Димитров, D-ro Z. Boĉev, A. Gârgarov, D. Bastreva, J. Ivanov, A. Andonov, R. Vasileva . . .	7
V. Ivanova. Jubileo de Ivan H. Krâstanov . . .	9
T. Kulagin. Novaĵoj el Sovet-Unio . . .	11
M. Staneva, V. Bozarov. Neforgesebla heroo . . .	13

Kovrilpaĝo: Vidaĵo el Veliko Târnovo, malnova bulgara ĉef-urbo, kie laboros la internacia E-laborbrigado

Abonkotizo : jara — 1,40 levo, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro : por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14lv. Reklamtarifo : 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespond-anoncoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO : Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO : Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO : Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO : Ru. Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO : Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO : Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO : Karl Kvist, Deje, Box 10 —a.

**GLORA BULGARA EPOPEO**

Antaŭ naŭ jardekoj la apostoloj de la libero en la kvara revolucia departemento en Panagjuriŝte, sub la gvido de Georgi Benkovski, post kiam tralegis la „sangan leteron“ de Todor Kableŝkov el Koprivŝtica, flirtigis la standardon de la libero kaj per fusilpaŝoj, kuraĝa ribela kanto kaj alvokoj „Ribeluloj, ĉiuj al armiloj!“ proklamis la komencon de la glorplena Aprila Ribelo.

La kristale pura patriotismo, la senlima braveco kaj memofero de la aprilaj ribeluloj restos por ĉiam kiel nia nacia fiero kaj ekzemplo por sindona servo al la Patrujo.

La Aprila ribelo ankoraŭfoje asertis, ke kreantoj de la historio estas la popolamasoj. La simplaj plugistoj kaj ĝardenistoj, metiistoj kaj ŝafistoj, instruistoj kaj pastroj — jen la herooj de la Aprila Ribelo. En la flamoj de ĝi batalo reliefigis la majestaj figuroj de G. Benkovski kaj P. Volov, de T. Kableŝkov kaj V. Petleŝkov pro tio, ĉar ili fariĝis veraj esprimantoj de la popola volo, de la decidemo de vilaĝanoj kaj metiistoj ne lasi ŝtonon sur ŝtono de la turka feŭda sociordo, batalricevi la ribelon kaj la sendependecon de la Patrolando, sekurigi liberan vivon por si, por siaj infanoj kaj por la generacioj.

La aprilaj ribeluloj levis sin por batalo ne kontraŭ la turka popolo, sed kontraŭ la sultana despotismo, kontraŭ la neeltenebla subpremo kaj kruela ekspluatado, fare de la paŝaoj, bejoj kaj aliaj turkaj altranguloj, kiuj kaŭzis multe da malŝeliĉoj kaj suferoj ne nur al la bulgara popolo, sed ankaŭ al la turkaj popolamasoj.

Malgraŭ la ekskluziva amasa heroeco de la ribeluloj, la nesufiĉa organizado kaj la malbona armilaro, la manko de komunagado en la tuta lando estis la kaŭzo pro kiu la Aprila ribelo suferis malvenkon. Dekoj da vilaĝoj estis transformitaj je cindrejoj, estis pafmortigitaj centoj da ribelintoj, senindulge kaj barbare estis buĉitaj sur la vilaĝaj placoj kaj en la preĝejoj miloj da senkulpaj virinoj kaj viroj, maljunuloj kaj etaj infanoj, gejunuloj.

Ardan alvokon al la progresema homaro, parolojn, plenajn je nobla kolero kontraŭ la subpremantoj kaj iliaj helpantoj, parolojn, plenajn jen sincera kompato al la batalanta por sia liberiĝo bulgara popolo, direktis la mondfama verkisto kaj humanisto Victor Hugo, la gvidanto de la italaj revoluciuloj Garibaldi, la elstaroj rusaj verkistoj Ivan Turgenev kaj Feodor Dostoevski. En la rusa demokratia socio kaj popolamasoj de tiu plej potenca slava lando formiĝis vasta popola movado por helpo kaj solidareco

kun la frata bulgara popolo. Tiu movado portis en si veran demokratian karakteron kaj havis nenion komunan kun la streboj de la rusa carismo.

La majesta batalo kaj sinofero de la aprilaj ribeluloj en 1876 fariĝis motivo por la Liberiga rusa-turka milito en 1877—1878. La bulgara popolo kun sento de eterna dankemo memoras, ke per la ofero de ducent miloj da filoj de la frata rusa popolo estis batalakirita nia nacia liberiĝo. Nia dankego des pli profundigis, ĉar la frata soveta popolo ankoraŭfoje helpis al la ribelinta bulgara popolo en 1944 forigi la malamatan monarko-faŝistan diktatorecon kaj la invadintajn en nian landon faŝistajn hordojn de Hitler. La bulgara-soveta amikeco kaj kunlaborado en la konstruado de Nova Bulgario fariĝis la cefa faktoro, kiu garantias la rezultoplenan socialisman transformiĝon de nia karega Patrujo.

En la tago de la 90-jara jubileo de la glora Aprila epopeo ni kliniĝas antaŭ la hela memoro kaj granda heroaĵo de la popolaj ribeluloj, de Rakovski, Levski, Botev, kiuj preparis la nacian revolucion.

De ili ni, la bulgaraj esperantistoj, la tuta bulgara popolo ĉerpos ekzemplon por tutsindona amo al la Patrolando, por preteco doni ĉiujn fortojn kaj energion, se necese eĉ la vivon, por la defendo de nia socialisma Patrolando!

ELKORA DANKO EL SOVET-UNIO

Ordinare ni estas ĉiam okupataj kaj mankas tempo foliumadi la Esperantan vortaron. Abonu, akiru kaj akurate legu la belan, plaĉan „Bulgario“ -n, nun jam „Nuntempan Bulgarian“.

Dank' al la kunteksto la novaj por vi vortoj pli facile memoreblaj estas.

La plej rimarkinda estas, ke en „Bulgario“ estas tuŝataj kaj traktataj preskaŭ ĉiuj flankoj de nia ĉiutaga vivo: industrio, agrikulturo, muziko, opero, dramo, opereto, baletto, medicino, botaniko, elektro, tekniko, diversaj sciencfakoj, sporto, ĉiuj manĝaĵoj, ĉiaj vestoj, la hejma ilaro kaj uzataĵoj, kaj konversacioj pri ĉies profesioj.

Pli grave estas, ke „Bulgario“ tegas

simpatian modelan stilon kaj trafan vortaron, leksikonon por ne tro oftaj temoj.

Sed la plej grava estas, ke „Bulgario“ disvolvas nian karan lingvon. Vi trovos tie vortesprimojn, kiuj efektive atestas nian konfirmon, ke per Esperanto oni kapablas espimi ajnajn nuancojn de nia penso!

Traleĝu atente almenaŭ unu ĝian numeron, unu kajeron kaj vi mem konvinkiĝos.

La riĉenhava kaj belege ilustrita „Bulgario“ estas vera enciklopedio de la lingvo Esperanto, almenaŭ por nia ĉiutaga vivo!

Bransburg H. L., Luga

DU GRANDAJ DRAMAJ NOVE TRADUKITAJ EN ESPERANTON

Komence de 1966 aperis nova versa traduko en Esperanto de la granda tragedio „Reĝo Lear“ de Shakespeare. Samtempe — kaj de la sama tradukinto — aperis la hungara majstroverko „Tragedio de l' homo“ ĉe la eldonejo Corvina en Budapeŝto. Ĝi estas la unua literatura verko en Esperanto, kiu

povis aperi en Hungarujo post la milito.

Ambaŭ tradukoj profitis iagrade el pli fruaj, aperintaj inter la du mond-militoj. „Reĝo Lear“ estas la 15-a ĝis nun aperinta kompleta traduko el la dramoj de Shakespeare, kaj ĝi aperas okaze de la 350-jara datreveno de la morto de la angla geniulo.

100-JARA DATREVENO DE LA NASKIĜO DE PENĈO SLAVEJKOV

Ne ekzistas klera bulgaro, ne konanta almenaŭ kelkajn versaĵojn de la granda bulgara poeto Penĉo Slavejkov. Filo de la poeto Petko R. Slavejkov — konata socia aganto-demokrato el la epoko de la bulgara Renesanco — li trapasis malfacilan zigzagan vojon, kiel en la vivo mem, tiel ankaŭ en la literaturo. La iama bulgara soci-politika situacio vekis en la animo de la poeto potencon deziron batali kontraŭ la reakciaj fortoj, kolektiĝintaj ĉirkaŭ la reĝa kortego, kaj li pasie sin ĵetis en tiun ĉi batalon. Slavejkov ĉiam sentis profun-



dan admiron kaj respekton antaŭ la granda heroaĵo de la frata rusa popolo, verŝinta sian sangon por nia liberigo el la kvincent-jara kruela tiraneco de la turkaj paŝaoj kaj sultanoj. Li tre ŝatis kaj alte taksis la mondfamajn kla-

sikajn rusajn poetojn kaj verkistojn — Puŝkin, Gogol, Tolstoj, Turgenev. La bulgara popola poezio havis en la persono de Penĉo Slavejkov entuziasman adoranton. La tempo forportis iujn liajn erarajn konceptojn kaj purigis lian poezi-verkaron el la aluvioj de la dekadenca burĝa influo. Restis por brili per sia nevelkebla ĉarmo la grandega poezia heredaĵo de Penĉo Slavejkov, en kiu li prikantis la liberigajn batalojn de nia popolo, la glorajn agojn de la herooj dum la naci-liberiga movado. Li majstre ĉerpis el la belegaj motivoj de la popola verkaro, levis ilin sur novan, altan poezinivelon kaj verkis korajn lirikajn konfesojn, multaj el kiuj siavice fariĝis popularaj kantoj.

Eminentaj literaturistoj kaj sciencistoj en fremdlando, bone konante lian verkaron, proponis lian kandidatecon pri la Nobel-premio de literaturo por la granda poemo „Sanga Kanto“. Nur la subita morto de la poeto malebligis tiun altan internacian agnoskon (La Nobelpremio oni aljuĝas nur al vivaj aŭtoroj). La bulgara burĝaro kaj la reĝa kortego devigis la poeton forlasi Bulgarion. Kiel elmigrinto, malproksime de sia Patrolando, li mortis en la jaro 1912, en urbo Brunatte, Italio.

La Mondpaca Konsilantaro nun rekomendis celebradon de la verkaktiveco de Penĉo Slavejkov konekse kun la centjara datreveno de lia naskiĝo.

La bulgaraj esperantistoj ankaŭ partoprenas en tiu celebrado. Ili delonge konigis al la internaciaj esperantistaj socirondoj iujn el la plej belaj verkoj de Penĉo Slavejkov. Bedaŭrinde, ĝis nun oni ne povis eldoni en aparta libro la esperantlingvan tradukon de la „Sanga Kanto“, faritan de nia karmemora samideano Ilija Silvestriev.

Nia popolo povas fieri pro la alta pritakso, kiun, en sia telegramo, la amata proleta poeto Maksim Gorkij esprimis rilate al Penĉo Slavejkov, okaze de lia tragika vivofino: „La poeto estas koro de la popolo. Li estas senmorta“.

Kaj vere, Slavejkov vivas kaj ĉiam vivos en siaj realismaj kaj progresivaj verkoj, proksimaj de la popola vivo kaj saturitaj de humaneco kaj demokrateco. Per sia strebado penetri en la sentojn, en la vivon kaj la batalojn

de la popolo; per sia batalo kontraŭ la reakcia spirito en la socia vivo; per sia patriota entuziasmo al la Patrolando, Slavejkov ankaŭ en la nuna tempo inspiras ĉiujn homojn kun bona volo, kiuj batalas por paco kaj por defendo de la kulturo.

Nikola Aleksiev

membro de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco (NKDP), prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio (BEA) kaj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

CENT DUDEK HEROJ

de Penĉo Slavejkov

Cent dudek herooj kun lukt-ideal'
pereis jam en la unua batal'!
Inside embuskis de l' turkoj la hord'
kaj ilin per salvo surprizis ĉe l' bord'!
Pereis bravuloj en plena taglum',
sed tombon ilian ne scias ni nun —
ne scias ni nun!

Legende cirkulas pri ili la fam',
pri kiu mi aŭdis jam kiel infan',
ke brava junulo sur bord' de river'
flirtigis la flagon de kara liber'.
De l' juna gvidanto l' alvok' pri ribel'
eksonis solene al fora ĉiel' —
al fora ĉiel'!

Tra kampoj, arbaroj ektondris signal':
„En sankta hejmland' komenciĝas batal' —
ribelas jam tuta premata popol',
por sankta libero vekigis la vol' . . .
Patrujo, ni venas por helpi al vi!
Ni venas la vivon oferi por vi —
oferi por vi!“

Al voko ilia respondis la salv' . . .
Sed venis finfine de l' sklavoj la sav' —
plenumis la ĵuron la brava taĉment',
kaj ties glor' estas por ni testament'.
Jen brilas de la Libereco la Sun',
sed tombon ilian ne scias ni nun —
ne scias ni nun!

Jaro 1910

Tradukis: *Simeon M. Simeonov*

LA FUMANTO

de Toma Ajolov

Homo juna aŭ plenaĝa —
ĉu timema, ĉu kuraĝa,
elbuŝigas strangan fumon
same kiel kamentubo.

Aĉa fum' tabakodora —
ŝvebas tie ĉi, — en foro
de la cigared' sur lipo,
eŭ de nova bunta pipo. . .

Sklav' li estas — tion kredu,
sklavo al la cigaredo!
Kiam mankas la tabako,
vera febro lin atakas.

Estas kvazaŭ li malsana
kaj la vivon sentas vana.
La fumant' de ĉiu aĝo
estas ja ne tiom saĝa!

(Premiita en la Literatura konkurso)

JUNA ESPERANTISTO

SEMINARIO DISKUTIS PRI „LI KAJ ŜI“

Jam de multaj jaroj la Internaciaj Seminarioj de Germana E-Junularo estas pli kaj pli ŝatataj inter la junaj esperantistoj de Eŭropo kaj eĉ de transmaraj landoj. Tiun tradicion daŭrigis la 9-a Internacia Seminario de GEJ, kiu okazis de la 27-a de decembro 1965 ĝis la 2-a de januaro 1966 en moderna junulargastejo de Hamburg.

Temo de la Seminario estis: „Li kaj ŝi — junaj homoj en la moderna mondo“. Ke tio allogis — ja pruvas la multnombra partopreno: 90 gejunuloj el 16 landoj de 4 kontinentoj (Anglio, Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Francio, Germanio, Hindio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Malio, Nederlando, Svedio kaj Svislando). Kiel delegito de BEJ ĉeestis Nikola Pilev el Haskovo.

La seksan flankon de la temo detale traktis du prelegoj de Michael Zeilinger (Fürth), studento de psikologio kaj pedagogio. En la unua, „Kio estas amo?“, li klarigis la diversajn konceptojn pri amo kaj sekso, kiujn li pruvis malpravaj: la pruda, pseŭdonatura, brutala, sentimentala kaj ĝuadema. Li emfazis la neceson trovi pravan koncepton per detala konsidero de la diversaj aspektoj de interseksaj rilatoj, de celo kaj senco de la amo, de la loko de la korpa amo en la tuto kaj de la efiko de amo en la individua kaj socia vivoj. En sia dua prelego, „Ĉu amo estas lernebla?“, li unue traktis instrulibrojn pri amo (konstatante ke ilia nivelo ofte estas tre malsama), poste tuŝis la demandojn, ĉu entute oni povas veran amon instrui, kiamaniere ni povas lerni korpan amon kaj kiel plene realigi amon en la vivo, kaj fine — traktante la taskojn de sekspedagogio — venis al la konkludo, ke nur bona kombino de la

korpa kaj spirita flankoj ebligas harmonian am-kaj seksrilaton en la anima-psika vivo de la homo.

„Juraj aspektoj de internaciaj geedziĝoj“ estis la temo de la prelego de Prof. D-ro Lapenna, kaj la aŭskultantoj — kiel esperantistoj ja aparte scirolaj pri tio — ĉefe lernis, ke tiaj geedziĝoj renkontas multajn komplikojn. Ekzistas tamen tendencoj por egaligo de la juro rilate internaciajn geedziĝojn.

La prelego de D-ro Werner Bormann (Hamburg) pri „Ekonomiaj problemoj de virina laboro“ pruvis — kun statistikoj — ke malgraŭ la ĝenerale rekonita samrajteco de la virinoj ili kompare kun samprofesiaj viroj ofte suferas malavantaĝojn. La preleganto pledis, ke la virinoj streĉu siajn fortojn por atingi pli altrangajn postenojn en la ekonomia vivo kaj ke samtempe la viroj supervenku siajn malnovajn antaŭjuĝojn.

Ĉiujn prelegojn sekvis ofte tre longaj kaj ĉiam viglaj diskutoj, tiel ke — kvankam kompreneble ne estis eble ĝisfunde esplori la seminarian temon — oni povas nomi la rezulton fruktodona aŭ almenaŭ instiga al plua pensado. Okazis ankaŭ aparta diskutado de diverslandaj gejunuloj sur podio pri interseksaj rilatoj en iliaj landoj.

La seminario trovis bonan reĥon: La senato de Hamburg oficiale akceptis la partoprenantojn en la urbodomo, pri kio la televido dufoje elsendis filmraporton, kaj pluraj gazetoj atentigis pri la unika aranĝo.

Lige kun la 9-a I. S. okazis la Unua Seminario de TEJO por Edukado de Gvidantoj, en kiu partoprenis 13 nunaj aŭ estontaj funkciuloj de Landaj Sekcioj. Prelegis Prof. Lapenna (Prezidanto de UEA) pri la strukturo de

UEA, Günther Becker (ĝenerala sekretario de UEA) pri la rolo de informado kaj Ulrich Lins (estranaro de TEJO) pri TEJO kaj Landaj Sekcioj.

Ne necesas diri, ke la programo ankaŭ antaŭvidis distrajn partojn: Kulmino sendube estis la Silvestra Balo, kiun dum pli ol 6 horoj ĉiuj ĝuis dancante aŭ alimaniere amuzigante. La paŭzojn plenigis prezentado de du skeĉoj de Raymond Schwartz kaj Julio

Baghi, kaj en la unuaj minutoj de la nova jaro la seminarianoj admiris la imponajn piroteknikaĵojn sur la hamburga ĉielo.

Dum la adiaŭa horo montriĝis, ke ankaŭ tiuj, kiuj unuafoje partoprenis seminarion de GEJ, promesis denove veni. . . Tio por IS-„veteranoj“ jam estis memkomprenebla afero.

Ulrich Lins

(kunlaboranto de „Juna Esperantisto“)

KALEJDOSKOPO DE NIAJ KUNLABORANTOJ

LEIPZIG. Fine de januaro kunvenis la loka junularo por prepari sin por la internacia kunveno dum la printempa foiro en Leipzig. Fine oni decidis prezenti etan teatraĵon. La tuta esperantistaro de la urbo preparas aktive la specialan vesperon, al kiu aliĝis multaj alilandaj gastoj el tuta Eŭropo. Oni povas informiĝi ĉe: Deutscher Kulturbund, „Esperanto-amikoj“, 701 — Leipzig, Käthe-Kollwitz-Str. 115, GDR.

Bernd Weber — Falangio

(kunlaboranto de „Juna Esperantisto“)

PRAHA. Fondiĝis Junulara Sekcio de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Ĝi havas la taskojn de LS de TEJO kaj probable eniros ĝian membraron en Pécs, Hungario.

BEJ gratulas niajn ĉeĥoslovakajn geamikojn kaj deziras plensukcesan agadon kaj kunlaboradon surkampe de la Movado.

EKSKURSO AL PITORESKA LOKO

La 20-an de februaro la turista sekcio „Esperanto“ en Plovdiv organizis ekskurson al la loko „Sankta Petko“ okaze de la 93-jara datreveno de la glora pereco de la legenda Apostolo de la Libereco Vasil Levski. Partoprenis esperantistoj el Plovdiv kaj la distrikto, centoj da aliaj neesperantistoj turistoj. La pitoreska serpentumanta ŝoseo iĝis „nigra“ pro la longega homa kolono.

Post la alveno okazis riĉa belarta programo. Sekvis popolaj dancoj, amasaj rondodancoj kaj multaj amuzludoj. Tagmeze ĉiuj lacaj kaj malsataj malfermis la dorssakojn sur la verda tapiŝo de la montaro. . . Post eta ripozo — gajaj, ĝojaj kaj freŝoplenaj ni iris al Asenovgrad. . .

En la plano de la turista sekcio estas antaŭviditaj multaj similaj ekskursoj. Verŝajne plej interesa estos tiu al montodomo „Esperanto“ dum la somero. Jen la slogano de nia sekcio: „Ĉiu esperantisto — ankaŭ turisto“.

N. Bojaĝiev

Studento

SVIŠTOV. Jam du jarojn en la Supera financa instituto oni lernas fakultative Esperanton. Multaj gestudentoj vizitas la lecionojn, kiuj estas bone gvidataj de la instruisto St. Ilčev. Dum la lernojaro 1965/66 funkcias du kursoj por komencantoj kaj 1 kurso por progresintoj. La komencantoj jam korespondas kun eksterlandaj esperantistoj kaj ilia ĝojo estas granda, ĉar ili povas jam interkompreniĝi kun homoj el tuta mondo.

Dum decembro 1965 multaj studentoj-esperantistoj kune kun siaj kolegoj el Ruse vizitis Pollandon.

Nun honore al la Junulara esperantista festivalo en Loveĉ la societo komencis kampanjon por varbado de novaj membroj.

Cočo Kolarov

Korekto. En la artikolo „Esperanto en Latvio“ (No 3 de „Bulgara Esperantisto“) estas erare presita la nomo de la urbo Liemeris anstataŭ Ziemeru.

Bulgaraj Geesperantistoj, partoprenu amase en la festotago de la rozoj, kiu okazos en vilaĝo Rozino je la fino de majo. Pri la ĝusta dato kaj tagordo BEA eldonos specialan cirkuleron.

PLOVDIV. La 22-an de februaro okazis la ĵarkunveno de la societo „Studenta Impeto“. Ĉeestis membroj el ĉiuj superaj lernejoj de Plovdiv, gejunuloj, k-do I. Bataklijev — membro de CK de BEA, estraranoj de la Distrikta E-Komitato M. Danĉev, D. Danev k. a.



Jordan Angelov, ĝisnuna Prezidanto, legis la ĵarraporton kun rezolucio pri la estonta agado. Centran atenton oni donos al pliigo de la membraro, okazigo de printempa balo, altigo de la lingva nivelo, plej grava tasko por la societo. Okazis viglaj diskutoj, rekomendoj. . . En la novan Estraron eniris:

Prezidanto Fani Mihajlova, sekretario Nikolaj Bojaĝiev, membroj: Dobrinka Petkova, S. Pavlov, M. Pejĉinov.

Nikolaj Bojaĝiev
Studento

La 30-an de januaro okazis la ĵara kunveno de la E-societo „Kulturo“. Ĝi estis amase vizitita de la membroj. La prezidanto, k-do Ivan Bataklijev, parolis pri la agado de la societo dum 1965 jaro. Li menciis, ke multaj el la esperantistoj laboris bone, partoprenis la diversajn societajn entreprenojn. Oni akceptis rezolucion, per kiu la ĉeestantoj decidis plibonigi la agadon dum 1966 jaro — varbi pliajn abonantojn al „BE“, malfermi senpagajn E-kursojn, kunlaboradi kun aliaj E-societoj en la lando k. a.

D. Petkova

PROSLAV, DISTRIKTO DE PLOVDIV. La 10-an de februaro ĉ. j. okazis la ĵara kunveno de la E-societo „Paco“ en la vilaĝo, kiun partoprenis ĉiuj membroj. Ĉiuj parolis nur en Esperanto. Oni substrekis la sindonemon kaj la fervoron de la proslavaj samideanoj kaj ke estos necese altiri la junularon al la societa agado.

Estis elektita ankaŭ nova Estraro: prezidan-

to — Ilija Grigorov, sekretario — Petr Kamburov, kasisto — Stoiĉko Valeviĉarski kaj membroj — Stojan Bakarov kaj Ivan Radev.

Al la novelektitaj estraranoj kaj la geesperantistoj el la vilaĝo bonan poresperantan agadon kaj sukceson.

P. Kamburov

SOFIO. SSES „V. Peeva“ subskribis kontraktan por kunlaborado kun la Sofia Klubo por Internacia Amikeco — Interklub. La 5-an kaj 6-an de marto okazis komuna ekskurso al la banloko „Rudarci“. Partoprenis entute 150 gejunuloj kaj studentoj, ankaŭ eksterlandaj studentoj el Afriko kaj Azio. Sabate vespere oni aranĝis Balon okaze de la 8-a de marto — la Internacia Tago de la Virino. Dimanĉe — interesa futbalmatĉo „Eŭropo — Azio“ — 10:9; komunaj fotoj, gajaj ludoj, denove amuzfesto. Kun kantoj, modernaj dancoj kaj junulaj ŝercoj ni pasigis du tagojn en amika intima etoso.

La 9-an de marto en Sofio estis aranĝita solenaĵo kun posta projekciado de filmo okaze de la datreveno: „20 jarojn de Libera Germana Junularo“. Tre interesan prelegon faris speciala gasto de la ambasadorejo de GDR. Poste la ĉeestantoj direktis diversajn demandojn, amike interbabilis.

JDR

KAZANLÂK. Je la 14-a de februaro la Urba Komitato de Patrolanda Fronto, la Urba Komitato de la Pacbatalantoj kaj E-societo „Roza Valo“ organizis grandan tuturban kunvenon por celebri la centjaran datrevenon de la eminenta franca verkisto Romen Rolan.

La esperantisino Pavlina Jonĉeva prelegis pri la vivo de la granda verkisto kaj batalanto por Paco, defendanto de Georgi Dimitrov en 1933 en Leipzig.

La publiko aŭskultis atente la prelegon, K-ino Jonĉeva substrekis la pozitivan opinion de Romen Rolan pri Esperanto. La aŭskultantoj forte aplaudis la bonegan prelegantinon.

K-ino Vlaeva tralegis kaj la kunveno akceptis protestan telegramon al la Usona registaro kontraŭ la mortigado de senkulpaj homoj en Vjetnamio.

Lernantinoj de Dua politeknika gimnazio plenumis recitadon el la korespondado inter Romen Rolan, Anri Barbjus kaj Georgi Dimitrov.

Tiaj solenaĵoj lasas bonajn impresojn en la koroj kaj la animoj de la ĉeestantoj. Per ili ni propagandas la noblajn celojn kaj ideojn de nia movado.

Ivan Zahariev

PEŠTERA. En la klubejo de E-societo „Nova Epoko“ la loka esperantistaro okazigis sian jaran kunvenon. Raporton tra legis la prezidanto k-do Ŝ. Kukuŝev, emfazante ke dum la pasinta jaro la membroj partoprenis amase la entrep-



renojn de la societo. Oni proponis diversajn aranĝojn dum la kuranta jaro — kolektiva korespondado kun esperantistoj el diversaj landoj, malfermo de E-kursoj por instruistoj, aĉetado de E-libroj, propagandaj vesperoj por Esperanto k. a.

Ŝ. Kukuŝev

ВЪЗСТАНОВЕНО ЕСПЕРАНТСКО ДРУЖЕСТВО В ДВЕ МОГИЛИ

По инициатива на стария esperantist Д-р Захари Бочев, на 14. II. 1966 г. в с. Две могили бе възстановено Есперантското дружество „Д-р Л. Л. Заменхоф“. Избрано бе ново ръководство в състав: председател Асен Иванов Коев, секретар Д-р Захари Бочев, касиер Сребро Пенчев Иванов и отговорник за работата в училищата Нейко Нейков, учител.

Предстои откриване на курсове за изучаване на esperanto за граждани и за ученици в Селскостопанския техникум.

Йор. Димитров

E-societo „D-ro Zamenhof“ komencis novan vivon. La prelegon „La mondo havas internacian lingvon“ de Kun'o Vălev ni jam tra legis antaŭ la instruistoj, kaj ni intencas tra legi ĝin antaŭ aliaj kolektivoj.

D-ro Z. Boĉev

KJUSTENDIL. Post longjaraj klopodoj por klubejo finfine ni sukcesis akiri tian dum novembro. Kvankam jam estis malfrue, tamen ni sukcesis ĝin aranĝi kaj je la 16-a de decembro ni celebris la naskiĝtagon de Zamenhof. La klubejo estis plena.

Pri la vivo kaj verko de Zamenhof prelegis k-do A. Gârgarov.

Ni organizis ankaŭ 3 E-kursojn por komen-
cantoj: unu en la Poŝtejo, gvidata de k-do Popov, kaj du en la klubejo, kiujn gvidas k-do A. Gârgarov. La kursoj progresas bone.

Do, ni esperas, ke „Flamo“ vere ekflamos. Nun ni planas esperantan renkontiĝon je la 21-a—22-a de marto, kiam okazos la printempa festo de Kjustendil, sur „Hisarlâka“ kun granda solenaĵo: muziko, dancoj, kantoj k. a.

Prezidanto: **A. Gârgarov**

V. ŠIPKA, DISTRIKTO DE STARA ZAGORA. La E-societo „Šipka“ okazigis sian jaran kunvenon en februaro ĉ. j., kiun partoprenis ĉiuj membroj. La prezidanto de la societo raportis pri la agado de la jaroj, pri la E-kurso dum p. j., pri la kolektado de subskriboj al UNO k. a. Estis elektita nova estraro: prezidanto Cvjatko Dimitrov, sekretario Georgi Dimitrov, kasisto Kalirka Taneva.


D. Bastreva

PLEVEN. La E-societo „Mondpaco“ de la fervojistoj, kiu estis fondita antaŭ nelonge, jam komencis agadi. Estas malfermita E-kurso por komencantoj, kiun gvidas k-do J. Ivanov. La nova societo kunlaboras ankaŭ kun la urba societo „Eterna Amikeco“, esperante ke la rezultoj estos pli fruktodonaj kaj sukcesaj.

Joĉo Ivanov

BURGAS. E-societo „Nigra Maro“ celebris la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Ni kunvenis, rakontis diversajn okazaĵojn el la movado kaj pri Zamenhof.

Ni kolektiĝis en la restoracio „Internacional“. La muroj estis belege ornamitaj per standardoj kaj sur la tabloj estis flagetoj. La orkestro ekludis la Esperantan Himnon, kaj ĉiuj partoprenintoj leviĝis kaj ekkantis solene. La re-



storacio estis plenplena kaj la publiko brue aplaudis.

La festado daŭris ĝis malfrue kaj la partoprenintoj estis kontentaj kaj gajaj.

Argir Andonov

НОВА ТУРИСТИЧЕСКА СЕКЦИЯ В РУСЕ

По инициатива на Градското туристическо дружество „Приста“ и Окръжния комитет на Българския есперантски съюз в гр. Русе, на 6. II. т. г. бе учредена Туристическа секция „Есперанто“ към ОК на БЕС.

Записаха се за учредители повече от 100 туристи-есперантисти. Секцията организира първия си масов излет с влак до гр. Бяла на 20. II. в чест на изборите с богата художествена предизборна програма.

Новата секция проектира изграждането на

своя туристическа хижа в поречието на река Русенски Лом, както и провеждането на редица интересни мероприятия.

Йорд. Димитров

POMORIE. La 17-an de februaro okazis la jara kunveno de la E-societo en la urbo. Oni substrekiis, ke ĝia agado estis ne tro bona, nesufiĉa. Tamen lastatempe la societo progresas. Estis organizita E-kurso por komencantoj. Ankaŭ la nombro de la societaj membroj pli grandigis. Ni esperas ke dum la kuranta jaro ni laboros pli bone kaj ni havos bonajn rezultojn.

Radka Vasileva

JUBILEO DE IVAN H. KRASTANOV

En la aŭtuno de 1965 estis celebrita la 75-jaraĝo kaj 60-jara esperantisteco de la akademiano Ivan H. Krâstanov.



Ljuben Marikin malkovris la riĉan kreaĝon de Krâstanov, kiu per siaj verkoj estas kontribuanta multon por la movado. Liaj originalaj kaj tradukitaj libroj, liaj multnombraj broŝuroj, artikoloj, paroladoj, lia „Bulga-

ra lando kaj popolo“ kaj precipe lia „Bulgara antologio“ (prozo kaj poezio), tradukita en ĉina lingvo, samkiel liaj Esperanto-lernolibro kaj Duobla Vortaro de Esperanto, oficiale aprobitaj en 1912 j. de la Ministerio de Publika Instruado — estas unuj el la plej konsiderindaj verkoj internaci-lingvaj antaŭmilitaj. Nun li prespretigas sian „cig-nan kanton“ — dolĉaj rememoroj de veterano — multilustritaj vojaĝnotoj kaj impresoj. Ne vane la nomo de Krâstanov figuras en tri enciklopedioj: bulgara, esperanta, franca.

La jubileulo deklaris, ke kiu plenumus sian homdevon, tiu ne faris ĝin por laŭdoj kaj aplaŭdoj, ke forpasintaj antaŭuloj ankaŭ devus esti dankataj, ĉar ili boris la krutan vojon por la diskonigo de la homama verko de Zamenhof kaj tuj poste li dum tuta horo galope pentris unu post alia centonon de la bildoj de sia modesta vivo kiel esperantisto enlande kaj eksterlande.

Naskita en Pirdop en 1890, Krâstanov eklaboris kaj eklernis samtempe, finstudinte filologion kaj diplomation. La kompara lingvoscienco allogis lin jam de knaba tempo, kaj li ĉiam benis la tagon, kiam en la fino de 1904 hazarde atentigis lin ĵurnala reklameto pri Esperanto. Li tuj venigis al si la lernolibron de Popov kaj Oreškov, eklernis la lingvon, sendis entuziasman leteron al ĝia aŭtoro en Varsovio kaj

depost 1905 senĉese kunlaboras en multaj Esperanto-gazetoj, en 1908 ekredaktas „Bulgara Esperanto-Biblioteko“-n, skribas artikolojn, faras paroladojn, gvidas kursojn. Li multe korespondadis.

Dum sia 20-jara vivado en fremdlando li sukcesis viziti ĉiujn eŭropajn landojn kaj parton de Azio kaj Afriko.

Ni ĉiuj lin aŭskultis kun atento kaj admiro. Li parolis facile kaj rave. La eleganteco kaj la poezieco de lia lingvo donas eblecon al tiuj, kiuj lin aŭdis, certigi, ke por la esprimo de la homa penso en ĉiuj ĝiaj nuancoj Esperanto ne cedas al la t. n. naturaj lingvoj.

Krâstanov estis pacamanto-vegetarano kaj sian patriotismon li pruvis per la armilo de la lingvo, instruante kaj pledante la nacian aferon je la unua Internacia Konferenco por daŭra paco en Bern 1917, kie unuanime estis akceptitaj du liaj proponoj pri Bulgario kaj Esperanto.

Lia agado lin ligas kun vico da mondfamaj verkistoj kaj scienculoj kiel Ivan Vazov, Henri Barbusse, August Forel k. m. a. kaj kiel oficiala delegito de Bulgario en pluraj universalaj kongresoj de Esperanto li konatigis kaj intervjuis

la aŭtoron de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof kaj lian tutan familion, kiu tre ŝatis la bulgarajn esperantistojn kaj posedas multajn korespondaĵojn de li.

En 1912, tuj post la unua jubilea E-kongreso en Krakovo, kie li estis oficiala delegito de la Bulgara Instru-ministerio, laŭ propono de la konata Esperanto-poetino Marie Hankel, Krâstanov estis elektita kiel lingva komitatano kaj pli poste ankaŭ membro de la Esperanta Akademio. Vastan agadon li disvolvis ankaŭ kiel vicprezidinto de la Bulgara Esperantista Societo, kiel redaktoro de ĝia organo „Bulgara Esperantisto“, kiel prezidinto de naciaj E-kongresoj kaj nemalprave nia hungara E-poeto D-ro Kaloĉaj en siaj „Rim-portretoj“ lin nomas „Krâstanov fera diligento“.

Deklaminte tri belajn bulgarajn renesancajn kantojn en E-traduko, li finis per la Zamenhofa testamento pri konkordo, paco kaj amo.

Pri akademiano Krâstanov oni povas multon paroli.

Al la jubileulo estis transdonitaj gratuloj, floroj kaj donacoj kun bondeziroj daŭrigi ankoraŭ multajn jarojn sian senlacaĵan agadon.

Ves:la Ivanova

USONAJ LINGVISTOJ FAVORAS ESPERANTON

Monde konataj lingvistoj kiel Mario Pei kaj Uriel Weinreich troviĝas inter granda nombro de usonaj lingvistoj, verkistoj kaj aliaj intelektuloj, kiuj ĵus esprimis sian preferon por Esperanto. Ili ĉiuj subskribis specialan Proponon, kiun UEA intencas prezenti al la Sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj. Entute jam 700 000 individuoj kaj pli ol 3000 organizaĵoj — sindikatoj, politikaj partioj kaj aliaj — subskribis la Proponon, per kiu ili petas ke U. N.

donu efektivan helpon al la Internacia Lingvo.

Kune kun profesoroj Pei kaj Weinreich subskribis la lingvistoj Tibor Halasi-Kun, John Lotz, Karl Menges kaj Louis G. Heller. Ankaŭ la advokato Mark Lane, konata kiel aŭtoro de baldaŭ aperonta libro „Kiu murdis Kennedy?“, esprimis sian apogon al Esperanto. Inter aliaj notindaj verkistoj troviĝas Harry Golden kaj Upton Sinclair.

Je la 16-a de februaro 1966 en Sofio mortis la filino de k-do Evlogi Zahariev, membro de E-societo „Maksim Gorkij“

Vanja

en sia 17-jara aĝo.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

Grava evento

Sindona, senlaca kaj energia laboro de malnova s-nino Benita Kāet en Tallinn (Estonio) ebligas regulan eldonon (tajpitan) de monata arte-kleriga revuo „Unuiĝo“. Lasta (januara 1966 j.) numero jam aperis amplekse je 26 paĝoj kun diverskaraktera altnivela senriproĉa E-enhavo. Adreso de la redakcio: Estonio, Tallinn, Tartu mnt. 45—6.

Turismo kaj Esperanto

Laŭ informo de Omska E-Klubo en turista bazo „Ora Pinarbaro“ apud la Norda Bordo de la lago „Ŝĉuĉje“ sur tereno de pitoreska kuracloko Borovoje (Kazahstan) nunjare en la dua duono de aŭgusto okazos la tria Sovetazia E-Tendaro.

Honore al la Majstro

La 12. XII. 1965 Moskva E-Klubo aranĝis vesperon, dediĉitan al la memoro de D-ro L. Zamenhof. Enkondukan paroladon, menciante la grandan meriton de l'alteklara kaj delikatanima kreinto de E-o faris k-do Teodor Kulagin. Pri Zamenhof kaj aktualeco parolis D-ro E. Salnikov. Kun la fundamenta ideo de homaranismo, kiun predikis Zamenhof — la ĉeestantojn (pli ol 70 personoj) konatigis Prof. E. A. Bokarev. Elpaŝis ankaŭ aliaj geesperantistoj kun rememoroj pri Zamenhof. La vesperon ĉeestis kun informa kaj salutparolado k-do Nikola Aleksiev el Bulgario. Li multe parolis pri MEM, kies prezidanto li estas.

Spegulo de unujara Laboro

La 26. XII. 1965 j. la prezidanto de Moskva E-Klubo D-ro E. Salnikov raportis pri la rezultoj de la unujara laboro de Moskva E-Klubo, pri la aktiveco de apartaj klubanoj kaj pri la pasiveco de aliaj, pri malaktiva laboro de la junulara grupo „Fajrero“, pri laboro de sekcio TEJA, UMEA kaj ISAE, pri la korespondkurso E-a, gvidata de

k-do N. Fedotov ktp. Entute la agado de Moskva E-Klubo dum la pasinta jaro estas agnoskita „Kontentiga“. Poste okazis reelektioj de la nova estraro Kluba. Elektitaj estis: D-ro E. Salnikov (Prezidanto), D-ro K. Lavrentiev (sekretario), k-do T. Kulagin (delegito-informanto), k-do I. Palkin (peranto) kaj D-ro A. Lipec (eldonlaboro). Aktive laboris eldona komisiono ĉe Moskva Domo de Amikeco kaj internaciaj ligoj de Sovetaj Esperantistoj. En pasinta jaro estis eldonitaj grandkvante jenaj libroj: „Por la paco“ — III-a kajero; „Kantoj de Sovetaj komponistoj“ (kun muziknotoj); „La sorto de l'homo“ de Mih. Ŝoloĥov; poeziaĵoj de Janis Rajnis — Latva popola poeto. Estas preparataj ceteraj libroj por eldono — kiel Poeziaĵoj de S. Esenin, kompleto de E-poeto G. Deŝkin, kiu baldaŭ festenos sian 80-jaran jubileon.

Novjaraj salutoj

Moskva E-klubo kaj E-Sekcio ĉe Kulturdomo de medicinistoj (Moskvo, K-9, ul. Gercena 19) ricevis el diversaj lokoj de la mondo pli ol 50 Novjarajn gratulkorespondaĵojn, pri tio la 9. I. 1966 komunikis D-ro E. Salnikov. Je la sama dato gasto el Pollando k-do J. Pioro salutis kaj interese rakontis pri vasta agado de PEA, kiu havas tra tuta lando pli ol 90 aktive laborantajn filiojn.

Novaj verkoj

La 16. I. 1966 Prof. E. Bokarev rakontis, ke Moskva Filozofia Instituto preparas por eldono novajn librojn: 1. Kiel aperis ĝenerala lingvo? de aŭtoro Svadost. 2. Pri internacia lingvo de scienco, de aŭtoro E. Lemberg. Tiuj verkoj estas tre proksimaj al niaj ideoj. Nun pri la teorio de internacia lingvo ekinteresiĝis kaj serioze okupiĝas speciala komisiono ĉe la Soveta Akademio de la Sciencoj.

*La vespero, dediĉita al memoro
de V. I. Lenin*

La 23. I. 1966 okazis raporto de D-ro E. Salnikov „Grandega vivo“ pri la nove preparata eldono de V. I. Lenin — Plena verkaro en 55 volumoj, kien devas eniri multe da novaj (ĉ. 1700) neniam publikigitaj materialoj. D-ro L. A. Kubasov sciigis pri eventuala alveno de Prof. Popoviĉ el Jugoslavio.

*20 jaroj de Internacia Demokratia
Virina Federacio*

La 30. I. 1966 oni aranĝis vesperon, dediĉitan al 20 jaroj de fondiĝo de Int. Virina Federacio (IDVF). Pri ĝia historio, evoluo kaj granda porpaca laboro elokvente raportis k-ino N. D. Sulje. K-do N. Danovskij informis pri la preparaj laboroj kaj redaktado de tute nova E-a Lernolibro de V. N.

Seriŝeva, kiu konsistos el 3 partoj: 1. Gramatiko, 2. Vortaroj, 3. Krestomatieto.

Nia gastameco

La 2. II. 1966 Moskvaj geesperantistoj havis renkontiĝon kun la gasto el Jugoslavio — ĉefa kaj respondeca redaktoro de Scienca Revuo Prof. B. Popoviĉ, kiu post vizito de Leningrad kaj Pulkovo revenis Moskvon kaj rakontis pri siaj vojaĝaj impresoj, pri eldona laboro de ISAE, okaze de ĝia 50-jara jubileo, ankaŭ pri E-movado en Jugoslavio kaj pri turista ripozdomo Primošten. Moskvanoj varme dankis la gaston pro la informoj kaj deziris al li feliĉan vojon dum reveno hejmen, kiun li intencis fari la 3-an de Februaro 1966 j.

Teod. Kulagin

Al Landaj Sekcioj de TEJO
Landaj Sekcioj de STELO
Junularaj Delegitoj de UEA
La Esperantista gazetaro

Ĉeĥoslovakio
Praha, la 1-an de
februaro, 1966

Karaj geamikoj, ni informas vin pri la fondo de la

JUNULARA SEKCIO DE ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Kiu de nun fariĝas oficiala reprezentanto de junulara esperantista movado en ĈSSR. Kiel gvidanto de la sekcio estis komisiita Mikuláš Nevan (Praha 3 — Vinohradi, Horní Stromky 14).

Ĉefaj celoj: organizi kaj kunordigi enlandan junularan Esperanto-agadon; kunlabori kun TEJO kaj ĝiaj landaj sekcioj; kunlabori kun STELO kaj ĝiaj landaj sekcioj; aktive partopreni internacian E-movadon kaj organizi la abonadon de Kontakto kaj aliaj E-gazetoj por la junularo.

La gvidantaro de la nove starigita sekcio petas ĉiujn funkciulojn noti ĉi tiun adreson: Junulara Sekcio de ĈSEK,

Praha 2, Blanická 4,
Ĉeĥoslovakio

Esperante viglajn kontaktojn ni amike salutas vin

Ĉeĥoslovaka E-komitato
Junulara sekcio

Letervespero kaj la unua Esperanto-ekspozicio en urbo Panevezys organizota en majo 1966. Bonvolu skribi multnombre kaj sendi esperantaĵojn al: Litova SSR, Panevezys, Kulturdomo, Esperanto. Antaŭe ni korege dankas kaj respondos al ĉiuj. Gesamideanoj, helpu al ni en propaganda laboro.

Antaŭ 34 jaroj, la 1-an de majo 1932 jaro, en vilaĝo Toros (nun Lazar Stanevo), distrikto de Loveĉ, estis mortpafita de la polico Dilo Jotov Bojnov.



Li naskiĝis je la 10. X. 1905 j. Dilo estis la sesa el la ok infanoj de siaj gepatroj. En la Unua mondmilito pereis lia plej aĝa frato Bojno. Lia frato Rajko estis membro de la Komunista partio ekde jaro 1919. Sub la influo de ambaŭ fratoj la tuta familio fariĝis progresema.

Por certigi la nutradon de sia multnombra familio la gepatroj de Dilo frue malsaniĝis kaj mortis. Restintaj orfoj, la infanoj estis devigitaj batali solaj en la vivo.

Dilo estis unu el la plej sciamaj lernantoj de sia instruisto Lazar Stanev. Speciale li bone lernis la matematikon, estis unu el la plej bonaj pentristoj en la lernejo, facile lernis la lingvojn. Pro manko de rimedoj li ne povis daŭrigi sian studadon kaj fariĝis laboristo en la magazeno de iu komercisto en Ĉerven Brjag. Malgraŭ la malfacilaj kaj pezaj kondiĉoj de sia laboro, li trovis tempon legi marksismajn librojn, viziti la klubejon de la Komunista partio kaj partopreni la vivon de la Komunista Junulara Asocio (Komsomolo). Sed li ne povis toleri sian mastron kaj forlasis lin. Li revenis en sian malriĉan domon kaj laboris kune kun sia frato kiel labristo-konstruisto.

En la jaroj 1925—1926 Dilo servis en la armeo kiel kanonisto en urbo Vraca. Rapide li fariĝis bona pafisto kaj revis posedi propran pafilon por la estonta revolucio de la

laboristoj kaj vilaĝanoj. Kaj kiam li estis en forpermeso li prenis sian pafilon kaj kaŝis ĝin en la vilaĝo. Pro tio oni lin kondamnis kaj post la fino de lia militservo oni lin malliberigis. En la malliberejo (en 1927) li havigis al si esperantan lernolibron kaj dum mallonga tempo ellernis Esperanton. Poste jam en la vilaĝo li trovis adresojn kaj komencis korespondi kun esperantistoj el Sovet-Unio, Ĉinio kaj aliaj landoj.

En la vilaĝo Dilo partoprenis la aktivan kulturklerigan agadon, organizitan de la ĵus reveninta el la malliberejo lia instruisto Lazar Stanev kune kun aliaj eksigitaj instruistoj, gelernantoj kaj gejunuloj.

En la jaroj 1928—1929 Dilo lernis metion ĉe sia kamarado de la infanjaroj Dimitr Todorov. Dilo kaj Dimitr estis ligitaj per komuna intereso al scienco kaj literaturo. Ambaŭ posedis Esperanton. Dilo daŭrigis la korespondadon kun laboristoj el diversaj landoj. Per la leteroj li ricevis multajn informojn.

En Dilo estis unuigitaj la fizika kaj spirita beleco. Li estis la plej amata vizitanto de la junularaj vesperamuzoj, kamaradaj kunvenoj kaj plej dezirata preleganto. Li estis abstinenculo.

Pro tiuj liaj kvalitoj Dilo estis unuanime elektita kiel sekretario de la vilaĝa organizaĵo de RMS (Laborista Junulara Asocio). Li fariĝis ankaŭ membro de la Laborista Partio kaj eniris en la partian gvidantaron. Per sia klerco, laboremo, honesteco kaj modesteco li gajnis la korojn de la tuta junularo en la vilaĝo. Li instruis al la junuloj Esperanton. Kiam oni malpermesis al li gvidi la kursojn en la lernejo, Dilo kolektis la junulojn en sia patra domo, kiu fakte fariĝis junulara kaj partia klubejo. Tie la junuloj legis la progreseman gazeton, tie oni kunsidis; tie oni organizis infanan kaj virinan grupojn, tie oni lernis kaj kantis laboristajn kantojn.

Okaze la 1-an de aŭgusto 1930 (La internacian tagon kontraŭ la milito) Jotov dumnokte pendigis ruĝan standardon, kiu portis surskribon: „For la kontraŭsoveta milito!“, sur la plej alta loko en la vilaĝo — la preĝejo sonorilturo. La standardo flertis kelkajn horojn dum la tago ĝis kiam la polico malfacile ĝin forigis.

Okaze de la internacia junulara tago en septembro 1930 RMS organizis surmuran agluon de centoj da sloganoj, en kiuj oni volis la forigon de la leĝo por defendo de la ŝtato, liberon por la gazetaro, politikajn rajtojn por la virinoj k. a. Tio furiozigis la policon kaj ĝi arestis multajn homojn, inter kiuj estis Dilo Jotov kaj Mara Staneva, kiujn oni liberigis post unu monato.


En januaro 1931 okaze la datrevenon de la morto de V. I. Lenin, Dilo organizis ĝian ce-

lebradon. La vilaĝo estis sieĝita de la polico, sed tio ne malhelpis al la gejunuloj alglui centojn da sloganoj. La firmaaj surskriboj de ĉiuj magazenoj estis anstataŭigitaj per ruĝaj.

La reakciuloj furiozis. La polico arestis la tutan partian kaj junularan aktivularon, inter kiuj estis ankaŭ Dilo. En la „Socia sekureco“ de Pleven oni torturis lin. Li estis kondamnita je malliberigo kaj oni translokigis lin en la malliberejojn en Kârĝali kaj Stara Zagora por „eduki“. Lin. Dilo eliris el la malliberejo en januaro 1932 kaj estis renkontita de la laboruloj en la vilaĝo per muziko, floroj kaj granda mitingo. Tie li diris: „... Mia batalo estas nur momento de l' batalo de la laborista klaso. Al ni antaŭstaras ankoraŭ pli pezaj bataloj kun la klasa malamiko ĝis la fina venko. Ni pretigu niajn vicojn!“

Denove la patra domo de Dilo reviviĝis. Ekbolis vigla agado. RMS estis sur sia posteno. Sed la agado de Dilo ne limiĝis nur en lia naskiĝvilaĝo. Kiel membro de l' Partio kaj Komsomolo li laboris ankaŭ en la regiono kaj en la distrikto — li organizis sekretajn junularajn kaj partiajn konferencojn, RMS-ajn grupojn.

... Proksimiĝis la 1-a de majo 1932. La reakciuloj en la vilaĝo furiozis. La polico malkaŝe minacis, ke je la 1-a de majo oni faligos kapojn, oni verŝos sangon. En la vilaĝo cirkulis onidiroj, ke la faŝistoj anticipe estis elfosintaj tombon por Dilo Jotov. Sed ĉio ĉi ne malhelpis al la partio kaj junulara organizaĵo pretigi sin renkonti sian batalfeston. Dilo faris lignan stampilon kaj stampis per ĝi sur multaj ruĝaj rubandoj: „Vivu la 1-a de Majo!“



Matene je la 1-a de Majo la gejunuloj ornamis la homojn,

Dilo estis inter la homoj kune kun siaj kamaradoj. Ili promenadis sur la ŝoseo en la periferio de l' vilaĝo kaj pretigis sin komenci manifestadi. Sur la brusto de Dilo brilis la ruĝa rubando kaj la verda esperantista stelo. Iu policano ordonis al li demeti

sian ruĝan rubandon, sed Dilo ne obeis. La policano mortpafis lin en la kapo kaj li falis sur la ŝoseon. Lia sango ŝprucadis, sed la policanoj, la vilaĝestro malpermesis al kiu ajn proksimiĝi al li. Tiel li kuŝis ĝis la vespero. Kiam al li proksimiĝis M. Staneva, arestita proksime al li, kaj demandis lin, ĉu li estas viva, li metis sian manon sur sian ruĝan rubandon. Se al li estis donita medicina helpo, lia vivo povus esti savita. Ĉiuj homoj indignis. En tiu tempo alvenis la regiona poliestro kune kun policanoj, soldatoj. La vilaĝo estis sieĝita.

Dilo Jotov mortis dum la nokto je la 3-a de Majo 1932 j. en fako por arestitoj de la malsanulejo en Pleven.



La morto de tiu ĉi fidela filo de la popolo estis peza perdo de l' komunista movado. Ĝi inspiris la laboristojn en la tuta lando protesti kontraŭ la polica teroro. En ĵurnalo „Rabotniĉesko delo“ n-ro 40 de 14. V. 1932 j. estas publikigita ankaŭ la protesto de CK de Laborista Esperantista Asocio, subskribita de la sekretario Nikola Aleksiev. Lazar Stanev kaj la tuta laborista grupo en la parlamento protestis. Lazar Stanev organizis enketon en la vilaĝo Toros, kie publike estis senmaskigitaj la mortigintoj de Dilo Jotov kaj iliaj protektantoj. La rezultoj de la enketo estis publikigitaj en la laborista gazetaro.

La dekmiloj da viktimoj, kiujn nia laborpopolo oferis, unuigis pli forte ĝiajn batalantajn vicojn. Ilia abunde verŝita sango certigis la venkon je la 9-a de septembro 1944 jaro.

Nun sur la loko, kie estis mortpafita Dilo Jotov, liaj samvilaĝanoj starigis monumenton kun lia busto.

La 10-an de oktobro 1965 j. en v. Lazar Stanevo estis celebrata la 60-jara datreveno de Dilo Jotov. Antaŭ liaj multnombraj samvilaĝanoj, kamaradoj kaj gastoj parolis lia kunlaborantino M. Staneva.

Estis organizita literatura kaj muzika programo kaj vizito de lia monumento, kie oni metis multajn florkronojn.

Mara Staneva, Vasil Bozarov

Bulgario

Stefan Gerĝikov (instruisto), Aksakov 18, Sliven, blok „Stefka Ĉamurova“, kun ĉl. pri ĉt. interŝ. PM, IPK kaj E-aĵojn.

Kosta Arnaudov (45-jara), str. Metohia 14, Sofia 73, kun Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Finnlando.

Lernantoj de V ĝis VIII kl. komencantoj — kun ĉl. Skribu al: E-societo „Internacia amikeco“, Dimitrovgrad.

Donka Koleva (lernantino VI kl.), str. Groseto, bl. 7, ap. 4, Dimitrovgrad.

Irina Zaprianova (lernantino IV kl.), bulv. „Georgi Dimitrov“ 1, Dimitrovgrad.

Marina Vasileva (lernantino VI kl.), str. „2 septemvri“ 21, Dimitrovgrad.

Donĉo Tenev (lernanto VI kl.), str. „5 dekemvri“ 15, Dimitrovgrad.

Slavka Petrova (lernantino VII kl.), str. „2 septemvri“ 36, Dimitrovgrad.

Rosica Ovĉarova (lernantino VI kl.), str. „Stanke Dimitrov“ 6, Dimitrovgrad.

Petja Stamatova (lernantino VI kl.), bulv. „Lenin“ bl. 23, vh. A, Dimitrovgrad.

Tjanka Miteva (lernantino VI kl.), str. „Vasil Levski“ 43, Dimitrovgrad.

Hristinka Delĉeva (lernantino VI kl.), str. „Na mira“ 8, Dimitrovgrad.

Nikola Gjurnev (23-jara), v. Baldevo, Blagoevgradsko — kun la tuta mondo, interesiĝas pri sporto, moderna muziko, gramofondiskoj, PK, PM, fotoj.

Lora Halaĉeva, str. Knjaz Emeretinski 60, Loveĉ.

Pollando

Adam Sudol (19-jara), Debowalaka, (pow. Wabrzezno, woj. Bydgoskie, dez. kor. kun bulgaraj geamikoj; interŝ. PM, BK, sporto, muziko, filmoj.

Witold Fialkowski (21-jara, inĝeniero), Biskupiec Pom (p-ta Krotoszyny, pow. Nowe Miasto), dez. kor. kun junaj amikoj el Bulgario; kolektas il. PK, PM., gramofondiskojn, insignojn.

20 gekursanoj (diversaĝaj kaj diversfakaj), dez. kor. kun la tuta mondo. E-kurso, Dom Kultury H. Baildon, Griwicka 46, Katowice.

USSR

Natlny Andris Toĥanoviĉ, ul. Ĉkalova 48, k. 2, Petropavlovsk—Kamĉatka — kun ĉl. pri ĉt.

Leivaite Maria, Rŭtu 13, Pasvalys, Litovio — un ĉl.

Stase Blickaite (17-jara), Pasvalio rajonas. Krinĉinas, Litovio — kun ĉl.

Jŭri Oiokas (17-jara) str. Rŭa 171, Pärnu, Estonio — interŝ. PM, BK kun la tuta mondo.

Herbert Jŭrimae, Tartu, Turu 3—25, Esto-

nio — (instruisto-filatelisto) — kun ĉl. pri PM, PK, diversaj temoj.

Kalju Hanni (30-jara kemiisto), Tallinn, Piritu, Regati pst. 6, Estonio — kun ĉl. pri ĉt.

Heli Pill (18-jara f-ino), Tallinn 16, Mustamäe 54—21, Estonio — kun ĉl. precipe Meksiko, Grekio, Hindio, Francio.

Anne Lahe (18-jara studentino), Tallinn 4, Tööstuse 86-2, Estonio — kun ĉl. pri ĉt.

Helgi Jaakse (lernantiuo), Tallinn, Roo 47-1 Estonio — kun lernantoj el ĉl.

Instruistoj de Ĉe-metodo, kiuj bezonas diversajn bestojn el gumo, povas ricevi tiajn ĉe s-ano Johannes Palu, Tallinn 16, Sõlme 21, Estonio. Rekompenco laŭ interkonsento; ankaŭ PM pri temoj — kosmo, sporto, Esperanto.

L. Zlotnik, ul. Dzerzinskio 12—42, Vilnius-5, Litovio — kun bulgara aŭ greka esperantist(in)o el Sofio kaj el Ateno pri E., biologio, muziko, ŝako.

E-grupo de geknaboj (10—16 jaraj) deziras kontakti kun samaĝuloj el la tuta mondo. Skribu al: L. G. Kapustin, Nevzorovoj 72-7, Gorkij 6.

Moskva oblast, Kolomna — 8, Tendeznaja 33—5, Zajdman Jefim — 15 entuziasmaj studentinoj pri angla filologio, dua kurso, dez. kor. kun bulgaroj k. a. l. per Esperanto pri ĉ. t.

20 junaj geesperantistoj (13—17-jaraj) dez. kontakti kun infanaj E-rondetoj kaj kor. kun apartaj gesamaĝuloj el la tuta mondo: Barnaul 2, Palaco de pioniroj, E-rondeto.

Aristarov K. Ju., Leningrad — D 40, Dovostrebovanija — interŝ. kun ĉ. l. alumetetikadojn, gramofondiskojn, filmmuzikrevuojn, E-aĵojn. Respondo garantiita.

Sidorova Valentina (15-jara), str. Patriotiĉeskaja, d. 86, kv. 14, Zaporojje — 5, — interŝ. PM.

Gluhova Ljudmila (16-jara), str. Rekordnaja, d. 6, kv. 5, Zaporojje 6, — interŝ. PM, kinoaktorojn.

Seljavina Natalija (16-jara), str. Tregubenko, d. 19, kv. 11, Zaporojje — 6, interŝ. PK, kinoaktorojn.

Sviridov Vladimir P. (18-jara) str. Pobeda, d. 4, kv. 31, Zaporojjne — 1.

Ŝulga Anatoly D. (19-jara), str. Pobeda, d. 4, kv. 31, Zaporojje.

Ivanuŝina Lidija S. (19-jara), str. Pobeda, d. 47/a, kv. 50, Zaporojje — 33.

Savĉenko Nina (20-jara), str. Pobeda, d. 6, kv. 30, Zaporojje — 1, interŝ. PK.

Medvedeva Alefina F. (24-jara), prosp. Majakovskogo, d. 4, kv. 47, Zaporojje — 35.

Griŝaev V. N. (25-jara), prosp. Jdanova 31, Zaporojje — 1.

INDUSTRIA KOMBINUMO — SEVLIEVO

PRODUKTADO

DE:

1. Trotuar-kranoj 3/4 colojn
2. Akvo-teraj krampoj por asbesto-cementaj tuboj 60, 80, 100 kaj 150 mm
3. Pneŭmatikaj instalaĵoj por pan-produktadaj entreprenojoj kaj muelfabrikejoj
4. Kvadrataj planksifonoj
5. Lat-kestoĵ por pantransportado
6. Duoblaj lat-kestoĵ por transportado de nutrovaroĵ
7. Simplaj popolstilaj planktapiŝoj el lanfadenoĵ
8. Ĵakard-tipaj dukoloraj tapiŝoj
9. Litkovriloj
10. „Rapidi“ — 6, 9 kaj 11 mm
11. Ĉiuspecaj elektrofadenaj bobenoĵ
12. Gisferaj kaj latunaj muldaĵoj

SERVOJ


1. Teksado de Ĵakard-tipaj dukoloraj tapiŝoj
2. Teksado de Ĵakard-tipaj litkovriloj
3. Teksado de Ĵakard-tipaj tapiŝstrioĵ
4. Riparoĵ de ĉiuspecaj motorcikloĵ, bicikloĵ, radioriceviloĵ, televidiloĵ, leĝeraĵ aŭtoĵ kaj kamionoĵ, feraĵekipado de veturiloĵ, vulkanizado de kaŭĉukmaterialoĵ, renovigo de pneŭmatikingoĵ

Civitanoĵ,

profitu la altkvalitajn servoĵn de la Industria
Kombinumo — Sevlievo!



— UZINO POR AŬTOMOBILLOJ — urbo ŜUMEN



Produkta

rezervajn partojn kaj nodojn por ŝargaŭtoj „ZIL 150“
kaj „GAZ 51“ kaj
aŭtomatajn ĉasiojn SŜ-22.


ŜTATA INDUSTRIA ENTREPRENEJO „AGRIJA“ PLOVDIV PRODUKTADO DE PREPARAĴOJ KONTRAŬ PLANTPARAZITOJ

Fungicidoj:

Kupra hidrokarbonato
Kupra oksidklorido — 15
Agrizan — 35
Kuprocin
Sulfur-kalka solvaĵo


Insekticidoj:

Nikotino 95 – 98%, Nikotina sulfato 40%, Parazitin 50%, Parazitin 100%, Agritan 50%, Debelin, Heksahloran 120%, Heksahloran 200%, Lindan A-2,80%, Tiofenit 20, Zinka fosfido, Fostiol 40, Heksatin.



UNUIĜINTA INDUSTRIA ENTREPRENEJO—urbo KAZANLÂK, BULGARIO

UNIVERSALA



DENTUMFREZA

MAŠINO

Destinita por frezado de cilindraj dentradoj kun rektaj kaj oblikvaj dentaĵoj, kaj ankaŭ por helicoidaj dentradoj.

La strukturo de la maŝino garantias sufiĉan stabilecon kaj solidecon, tiel necesaj por altnivela produktiveco kaj precizeco (7-a grado) de la prilaborantaj radoj.

La maŝino funkcias per helicoidaj freziloj el rapide-tranĉanta ŝtalo.

La frezado de la cilindraj dentradoj efektiviĝas laŭ la metodo „alfrontere“ aŭ „laŭvoje“.

La modelo ZF 051 posedas hidraŭlikan mekanismon, pere de kio oni evitas la malstreĉitecon de

a ŝraŭbingo kaj de la ŝraŭbo por vertikala transdonado.

La maŝino funkcias laŭ fermita duonaŭtomata ciklo, ebliganta manipuladojn per pluraj maŝinoj.

ŜTATA INDUSTRIA ENTREPRENEJO „POBEDA“

urbo PAVLIKENI, Bulgario

PRODUKTAS:

rafinitan HELIANT-


OLEON

— en bareloj kaj boteloj

(1-litraj).

La oleo estas altkvalita

kaj stabila.



Redakta komitato: Kiril DRAŴEV, Dimitr ŴDRAKOV, Emil KEREMIDĈIEV, Atanas LAKOV,
Ivan SARAFOV (ĉefredaktoro), D. SIMEONOV, Simeon M. SIMEONOV
Adreso de la redakcio: Sofio, poŝtkesto 66 Tel. 3-26-82

